

Prof. Ivo Lapenna estinta prez. de UEA sendis leteron, en kiu li klarigas la kaŭzojn de sia eksigo. Jen parto de ĝi:

ESENCAJ KAŬZOJ DE MIA EKSIĜO

... Se persono, kiu dediĉis 46 jarojn de sia vivo al ĉiutaga laboro por Esperanto kaj 36 jarojn seninterrompe al UEA kiel ĝia estrarano, decidiĝas ekxiĝi el ĉiuj funkcioj kaj rezigni pri ĉiuj honorigoj, tiam evidente, malantaŭ la decido troviĝas escepte gravaj kaŭzoj. Mi rigardas kiel mian elementan devon informi pri ili, almenaŭ koncize la tutan membraron, precipe la ĉefdelegitojn kaj delegitojn, kiuj denove ĵus elektis min komitatano B per grandega plimulto de pli ol 83% malgraŭ la kontraŭaj nete politikaj instrukcioj de la funkciuloj en 4 orienteŭropaj landaj asocioj, harmoniigitaj kun la kampanio de iliaj politikaj samopiniantoj en la gvidantaro de TEJO.

La ĉefa principa kaŭzo de la eksigo estas la kruda malobservo de neŭtraleco...

... ligita kun malobservoj de Statuto ekz. rilate la demokratecon de elektoj de komitatanoj A.

... La malobservo de neŭtraleco fare de gvidantoj de la aliĝintaj landaj asocioj en Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Hungario kaj Pollando... kiu tuŝis rekte la neŭtralecon de UEA... malobservadoj tra t.n. Mondpaca Esperanto Movado (MEM), kiam ajn MEM per siaj politikaj rezolucioj kaŭzis al UEA malagrablajn ĝenojn antaŭ la aŭtoritatoj, malobservado de TEJO, kies maldekstrula estraro "elektita" surbaze de absurde blufaj membrociferoj, establis intimajn kontaktojn kun ekstreme maldekstraj politikaj organizaĵoj eĉ subskribis kontrakton pri kunlaboro kun la Monda Federacio de Demokrata Junularo (MFDJ), kiun pro ĝia subversiva agado la franca registaro elpelis el Parizo... Ĝi plej serioze kompromitis la neŭtralecon de UEA al kiu TEJO formale apartenas kiel junulara sekcio. Komprenoble, mi kontraŭstaris tiun kontraŭneŭtralecan agadon kaj mi fariĝis faligenda "bastiono de neŭtraleco" por uzi ilian propran esprimon.

En decembro 1973 mi eksciis, ke gvidantoj de la menciitaj 4 landaj asocioj... sekrete planas novan atencon kontraŭ la neŭtralecon de UEA. Mi opiniis kiel mian devon informi la membraron pri la afero kaj faris tion en la aprila ĉefartikolo. Ĉio antaŭvidita

en la artikolo plene realiĝis konforme al interkonsentita taktiko... por detruiri ian "danĝeran" idearon - en kazo de UEA la idearon ligitan al principoj de neŭtraleco, universaleco kaj demokrateco - ne sufiĉas nur rekte, sisteme atakadi la idearon mem "(mucida neŭtraleco", "kadavro", ktp. kaj samtempe praktikadi ĝian malon, sed necesas ankaŭ senskrupule kaj maksimume nigrigadi ĝiajn ĉefajn protagonistojn, en nia kazo unuavice min mem. La kampanio estis ligita kun hontindaj atakoj, inkluzive sendadon de krimaj anonimaj telegramoj, kontraŭ min persone. La du ĉefaj centroj de la komploto - tiu de la 4 orienteŭropaj landaj asocioj, gvidata de komitatano N. Aleksiev kaj tiu de sekreta kunveno en Kassel (inter alie U.J. Moritz, d-ino F. Szabò-Felsö, T. Jansson, Ulla kaj F. Luin) apogitaj de la aliancantoj en kelkaj aliaj landaj asocioj, intensigis sian kampanion de intrigoj, kalumnioj kaj misprezentoj per pliaj artikoloj en Heroldo. La Brita Esperantisto kaj 1-2 malpli gravaj periodaĵoj, per pli amasaj cirkuleroj de U.J. Moritz, E.J. Woessing, T. Boreama k.a. per pliaj konfidencaj kunvenoj, el kiuj la lasta okazis en Orienta Berlino. ... Ĉi tie sufiĉas menci, ke nova, tute politika 40-paĝa Programo de Bulgara Esperantista Asocio parte forĵetis la principon de neŭtraleco kaj anstataŭe postulas la aplikon de t.n. "proleta internaciismo".

Tiun tutan intelektan-moralan marĉon mi milde nomis "abscesoj sur la organismo de UEA" kaj senkompromise deklaris, ke mi foriros de ĉio, se la abscesoj ne estos sanigitaj.

... La bloko voĉdonis laŭ antaŭe faritaj interkonsentoj kaj elektis laŭplaĉe siajn homojn...

... Aliflanke ne estis elektitaj H. Holmes (Honora Prezidanto) D-ro P. Neergaard (mondfama sciencisto) G. Becker (ĝenerala sekretario de UEA), D-ro M. Dazzini (sekretario de ILEI), H. Behrman (la aŭtoro de Esperanto Programita), D-ro J. Wells (iam mondfama fonetikisto) E. Lapenna (multjara ĉefdelegito, komitatano kaj sekretario de la Belartaj Konkursoj), Prof. G. Waringhien.

... En Komitato kreiĝis artefarita plimulto, kiu ne spegulas, sed rekte kontraŭas la starpunkton de grandega plimulto de la membraro, kiel tion evidente montras la rezultoj de la elektoj de komitatanoj B kaj kortuŝaj manifestacioj okaze de la adiaŭa parolado.

Mi tutkore dankas al ĉiuj geamikoj, kiuj ebligis per komunaj fortstreĉoj konstrui la modernan,

prestigan kaj fortan UEA. Kompreneble, laŭ miaj eb-
lecoj mi plu laboros por la Internacia Lingvo, ĉar
malgraŭ ĉio, mi neniel perdis la konvinkon pri la
valoro de Esperanto, nek la fidon je tiu idearo
de humanisma internaciismo, kiu estas nedisigeble
ligita al ĝi. Sed mi povas kunlabori nur kun tiuj
Esperanto-organizaĵoj kaj plu flegi amikajn rilat-
ojn nur kun tiuj unuopuloj, kiuj senkompromise kon-
damnos tiun tutan komploton, laŭte aŭdigos sian voĉ-
on kaj agos konforme ĉu en la kadro de UEA, ĉu eks-
ter ĝi.

Aldono de redakcio: Ĉiuj partoprenantoj la Universal-
ajn Kongresojn konas bone senbridajn atakojn de MEM
kontraŭ Israelo kaj mirindan fotografajon kaj dub-
an artikolon, kiuj aperis en UEA ĵurnalaro dum la
lasta jaro. Ĉu ĝi devas esti pruvo de estonta
neŭtraleco?

Kun granda malĝojo ELI sciigas pri forpaso
de unu de niaj veteranoj s-ano Icchak Muĉnik el
Kfar Jehoŝua. Li estis multajn jarojn tre agema en
nia movado kaj skribis artikolojn en nia gazeto.
Dum la lastaj jaroj li estis severe malsana kaj
devis ĉesi sian agadon.

ELI kondolencas al la familio.

Daŭrigo de la paĝo 1.

La fama cionista gvidanto Naŭum Sokolov diris:
"Poemoj de Zamenhof estas la plej belaj cionistaj
poemoj, kiujn mi iam legis en la rusa lingvo.



60-a UNIVERSALA KONGRESO EN KOPENHAGO

Antaŭ dekelkaj jaroj, kiam mi estis komencanto
en nia lingvo kaj movado, mi vizitis Danlandon. Kiel
ĉiuj komencantoj mi volis ekpruvi utilon de noveller-
nita lingvo. Mi vizitis Skandinavion, al kiu mi ĉiam
sentis sentimenton, ĉar mi 3 jarojn travivis en Svedio.

Dumvoje mi estis en Kopenhago, kie mi vizitis
ges-onjn Kŭhlmann. (hodiaŭa prezidanto de LKK kaj
estrarano de UEA).

Neforgeseblaj estas la horoj en ilia ĝardeno
kaj loĝejo. Mi scipovis ekpruvi la gastamecon de Dan-
oj. Por komencanta fremdulo de malproksima lando ges-
anoj Kŭhlmann organizis solenan akcepton ĉe fajro
en ĝardeno kun aliaj danaj samideanoj. Ĝis hodiaŭ mi
sentas varmecon de tiu akcepto. Mi eksentis la util-
econ de nia movado kaj ĝian amikan etoson. Danlandan-
oj, ĉiam sinceraj, bonkoraj, gajaj scipovis ĝin krei.
Mi pensas, ke mia dediĉo al la movado en granda par-
to estas kaŭzita per tiu akcepto.

Samideanoj! Mi volas instigi vin mem ekpruvi ti-
on, kion mi ekpruvis antaŭ jaroj, veturu al UK en Ko-
penhago, kie la Kongreso estos certe pli ol en multaj
aliaj landoj agrabla, la homoj tie estas afablaj, gast-
amaj kaj helpantaj. La vidindaĵoj de Danlando estas ne-
kutime belaj. Mi speciale memoras mondfaman Tivoli, kie
povas amuziĝi junuloj kaj maljunuloj,
belan havenon de kiu oni povas jam vidi Svedion,
Grandioza estas tie la bestĝardeno kaj botanika ĝarde-
no. La verda lando de Andersen kaj de homoj edukitaj
je liaj fabeloj. Longaj tagoj, helaj vesperoj kaj
noktoj ĉiutage plilongigas plezuron kaj etoson de la
travivaĵoj.

Veturu kaj vi ne bedaŭros!

Detaloj ĉe peranto de UEA s-ano I. Israeli. T-A str.
Hercel 98.

d-ro H. Maŝler



LA PROGRAMO DE ARABAJ TERORISTOJ

Unuigitaj Nacioj invitis estron de palestinaj teroristoj partopreni sian ĝeneralan kunsidon.

Kiuj estas la palestinaj teroristoj?

Ilia oficiala nomo estas "Organizaĵo por liberigi Palestinon.- Ilia programo estas detaligita en la palestina traktato. Ĝi estas dokumento el kiu ni povas ekkoni ĝian oficialan vidpunkton. Ĝi estas akceptita dum la unua "Palestina Kongreso" en Jerusalemo 1964. En la jaro 1968 la traktato estis sangita en Kairo.

Jen kelkaj paragrafoj:

6./ En la Palestina ŝtato estos akceptataj kiel civitanoj nur Judoj, kiuj loĝis tie antaŭ la jaro 1917.

19./ Divido de Palestino en la jaro 1947 de la Unuigitaj Nacioj estos neniigita, ĉar ĝi kontraŭas la volon de palestina nacio.

20./ La deklaro de Balfur kaj teksto de brita mandato estos pripensitaj kiel ne valoraj. La historiaj kaj bibliaj postuloj de Judoj pri ilia ŝtato ne estas ĝustaj. Judaro ne estas nacio, sed Judoj estas nur civitanoj de diversaj landoj.

21./ Palestinanoj forĵetos ĉiujn solvojn, kiuj estas surogato de liberiĝo de tuta Palestino.

23./ Ĉiuj ŝtatoj, kiuj volas amikajn rilatojn kun Palestinanoj, - devas rigardi cionismon, kiel ne laŭleĝan movadon kaj malpermesi ĝian movadon.

24./ Sangi la traktaton povas nur plimulto de du trionoj de la voĉdonantoj de la organizaĵo.

Tio estas la vera vizaĝo de arabaj teroristoj, kies programo estas: detruiri Israelon.

POEZIO KAJ PROZO

J E M Ŝ A N

A. MAJKOV

La tufo de la stepa herb'...
Ĝi eĉ la seka bonodoras.
Kaj tuj pro ĝi en mia cerb'
beleco de la step' disfloras.

Delonge, kiam klan' post klan'
En stepo hordoj rab-vojaĝis,
Otrok kaj lia frat' Sirĉan
La plej heroe lukt-kuraĝis.

Kaj unufoje tiu hord'
Kaptinte predon de la Rusoj,
Kun bardaj kantoj, je konkord'
Festenis ĝoje en ulus'o.**

Subite - glava bru', horor',
Gehen' kaj morto senevita,
Kaj ĉiuj diskuradas for
Simile al birdar' timita.

Detruis ĉion la elan'
De Monomaĥ'o***. Plago kvazaŭ.
Al Dono fuĝis Ĥan' Sirĉan,
Otrok - al montoj de Kaŭkazo.

Pasadis jaroj... En stepar'
nur vento vagis libervoja...
Jen mortis Monomaĥ'o car'.
Kaj Rusio ploras pro malĝojo.

La bardon vokas Ĥan' Sirĉan
Kaj al la frato lin delegas:
"Li estas riĉa. Lia man'
Potence en Kaŭkazo regas.

vi diris: Ĉion lasu li
Ja nin plu oni ne katenas,
Al heredaĵ' de l' famili',
Al stepoj nepre li revenos.

Al li vi kantu pri patruj'
Kaj, se li kanton ne komprenos,
"Jen ŝan'on: sekan donu tuj
Al li- kaj certe li revenos."

Otrok en ora sidas tend'.
Ĉirkaŭas gastoj kaj vasaloj.
Jen li sur oro, sur arĝent'
Proponas vinon kaj regalon.

Eniĝas bard` kaj diras li,
Ke al la step`Otrok revenu,
Ke Monomañ` ne vivas pli,
Ke fratoj Rusion skui penu.

mur mokridetas je alvok`
De l`frato ĥano povoplana,
Ĥor`kantas gloron al Otrok
Kaj daŭriĝas la festeno.

Ekstaras bardo kaj kun kor`,
Kun arda amo kaj pasio
Kantadas pri kuraĝo, glor`,
Pri saĝo de l` popolo sia.

Otrok silentas, sed rigard`
Al servistaro obeema
Ordonas, ke foriru bard`,
Por plu ne skuu koran tremon.

La tufon de la seka herb`
Al ĥano tiam donis bardo.
Kaj ĥano kvazaŭ pro acerb`
Kvazaŭ sentinte vundon ardan,

La koron kaptis per la man`.
Okazis kio al la ĥano?
Severa, senindulga ĥan...
Priploras tufon li infane...

Subite ekleviĝis li:
"Ne car`mi plu de tiu horo!
-ekkriis,- Morto en patri`
Pli karas, ol fremdlanda gloro!"

Dum frumatena diafan`
Apenaŭ orumiĝis rokoj,
En montoj iras karavan`:
Otrok kun servistaro poka.

Pasante monton post la mont`,
-Ĉu baldaŭ kara step`? -atendas,-
Kaj al la dista horizont`
Herbtufon sekan li etendas.

El rusa -S. mizeruĥa

- * JEMSAÑ - bonodora stepa herbo
- ** Ulus - terspeco de unu klano ĉe antikvaj mongoloj
- *** Monomañ- rusa regnestro de XI-XIII jarcentoj.

MIRAKLOOKAZO AL BALANCSEĜO

(El la juda folkloro)

Tio ĉi okazis antaŭ multaj jaroj, kiam sub blazono de dukapa aglo sidis surtrone la bonmemorinda kompatema Francisko Josefo.

Multaj vilaĝoj tiam vegetis inter la Subkarpataj montoj de orienta Galicio, ĉirkaŭ juda urbeto. La tergrundo estis tie malfekunda, mankis herbo sur la montetaj deklivoj kaj ne abundis grajnoj en la spikoj. Tial mankis provizo por la brutaro kaj ne sufiĉis pano por la kamparanoj. La vilaĝanoj malofte veturis en la urbeton dum la semajnaj bazartagoj por vendi al la Judoj siajn rikoltojn, ovojn kaj kokinojn. Mankis al ili mono por aĉeti de la judaj butikistoj vestojn aŭ botojn, ili ne venadis al la-urbetaj metiistoj eĉ por ion ripari aŭ akiri novan plugilon aŭ jungilaron. Tial Judoj ne ricevis varojn por liveri al la grandurbo kaj mankis al ili mono por aĉeti en urbego varojn por revendado. Estis paŭperuloj la kamparanoj en siaj kabanoj kaj estis malriĉuloj Judoj en siaj mizeraj dometoj.

Al la juda komunumo mankis pagipovo por stratpurigisto kaj la bazara pavimo ne estis balaata. Sur la sinagoga korto kuŝis rubaĵo kaj sur ĝi libere vagis kokinoj, dum la kapro surgrimpanta sur la pajlkovritan tegmenton plenbuŝe ĝin maĉadis.

En tiu urbeto vivis maljuna rabeno. Li diligente plenumadis ĉiujn siajn ritajn devojn en la sinagogo, juĝis siajn komunumanojn kaj dum la nokto fervore studadis la Leĝaron. Sed ĉar la urbetanoj estis malriĉaj, estis lia salajro tre mizera. Lia kaduka dometo kliniĝis, la fenestroj estis ialoke ŝtopitaj per ĉifonoj, la tegmento truita kaj la pluvo trae ofte enpenetradis kaj gutis sur la argilan plankon. La meblaro estis eluzita kaj eĉ la seĝoj lamis, apenaŭ taŭgaj por sidado.

Unu tagon venis inspekti la urbeton la distrikta poliestro. Estis li tre alta, dikega kaj korpu-lenta viro kun oraj galonoj sur vesto, kupra ĥokardo surĉape kaj kun longa, laŭte tintanta sabro. Ĉiuj lin timis kaj profunde klinis antaŭ li la kapon. Revizinte la bazarplacon, li forte riproĉis la butikistojn.

pro la malpuramo apud iliaj pordoj, minacinte per altaj monpunoj. Poste li eniris en la dometon de la rabeno por esprimi la malkontentecon pri la ordmanko en la sinagoga korto. En la rabenan dometon li eniris sen alfrapo kaj ektimiganta rabeno ekstaris kaj bene salutis la altrangan gaston. Al rabenino li vokordonis al la venintulo prezenti sidlokon. Kiam ŝi proponis la apudan seĝon, ektimis la rabeno, ke ĝi iomete lamanta, ne eltenos la dikegan, multpezan gaston kaj rompiĝos sub li. Tial li petis la gaston unu momenton atendi kaj al la rabenino alporti el la dormĉambro la balancseĝon, kiu iam servis kiel lulilo de iliaj filoj.

Estis ĝi vere granda kaj larĝa seĝo kun sidejo krucmaniere plektita el fortikaj, pajlosimilaj plantfibraj strioj kun etaj aperturoj inter ili. Kvankam tre malnova, ŝajnis la balancseĝo esti plej bela honora sidilo por altofica gasto. Dum rabenino ĝin portis, la policoficiro laŭte alriproĉis la rabenon pro la senordo reganta en la sinagoga korto. Sed kiam la rabenino prezentis al la gasto surplete glas- on da brando kun nigra panpeco, la gasto mildiĝis, unuglute ĝin eltrinkis, elviŝis per maniko la lipojn, posttrinke ekmordis peceton da pano kaj eksidis... La seĝa plektikaĵo ne eltenis la ŝarĝon de la atleta dikulo kaj la oficiro enfalis trae en la truitaĵon. Post la penstreĉo li ekstaris ruĝvizaga pro kolero.

La konfuzita rabeno tuj ekstaris, ekpetis pardonon, helpis al la gasto leviĝi, proponis al li sian propran sidbenkon kaj diris:

-Al via oficira moŝto okazis la sama miraklo, kiun la bona Dio, estu li benata, faris al Jakobo, nia prapatro, dum ties vagado!

- Miraklo, -ekmiris la policoficiro, -miraklo ĉu malbonŝanco?

- Jes, miraklo, - insistis la rabeno, - kaj kun via permeso, mi rakontos al vi la okazintaĵon.

Kaj la rabeno komencis sian rakonton.

"La dudekoka ĉapitro de Genezo raportas pri la forkuro de Jakobo el sia gepatra hejmo. Fakte li forkuris timinte la venĝon de sia frato, Esav, kies bonon li elruzis. Sed la preteksto estis, ke li foriru al la domo de la patrino parencaro en landon Paden Aram, por tie trovi konvenan, nobeldevenan edzinon.

Rakontas la Biblio:

"Li venis al iu loko kaj restis tie, por pasigi la nokton, ĉar la suno subiris. Kaj li prenis el la ŝtonoj kaj metis ĝin sub sian kapon kaj kuŝiĝis... Kaj li sonĝis: jen ŝtuparo staras sur la tero, kaj ĝia supro atingas ĉielon, kaj jen anĝeloj de Dio iras sur ĝi supren kaj malsupren..."

Bonvolu rimarki, -emfazis la rabeno, - ke estas skribite: "prenis el la ŝtonoj", do multnombre. Dorminte viziis Jakob la Plejpotencan Dion, estu benata Lia nomo, aŭdinte Lian voĉon kaj ricevinte Lian benon. vekiginte diris Jakob: "vere, la Eternulo estas en ĉi tiu loko kaj mi ne sciis..." Kaj por signi la lokon, kie aperis la bona Dio, li, kiel skribite, "prenis la ŝtonon, kiun li estis metinta sub sian kapon kaj starigis ĝin kiel monumenton kaj verŝis sur ĝin oleon..."

Nun rimarku bonvole, ke ĉi foje estas klare skribita "prenis la ŝtonon", singulare. Do, aperas enigma problemo: kuŝiginte dormi, estas notite "el la ŝtonoj", multnombre; nun, leviĝinte, li trovis subkape ununuran ŝtonon! La misteron solvklarigis niaj antikvaj saĝuloj, kio estas priskribita en la libroj, nomitaj "Midraŝoj". Ili eksplikis la problemon jenmaniere: Kiam Jakobo kuŝiĝis tranokti, komencis la lokaj ŝtonoj kvereli inter si. Ekpostulis unu: "sur min metu la justulo sian kapon!" Ekpreĝis la alia: "sur min li metu la kapon!" Kion faris la bona Dio? Li mirakle kunfandis ilin kune kaj farigis ununura ŝtono... Tial vekiginte, trovis Jakob sub sia kapo nur unu ŝtonon.

La saman miraklon ripetis Dio, benon al Lia nomo, speciale por via moŝto. Jen la seĝo kies sidejo konsistis el multaj krucforme plektitaj strioj kun multaj aperturoj. Kiam la rabenino, estu ŝi sana, alportis por vi la balancseĝon, ekpetis ĉiu trueto la Dion: "sur min metu la oficira moŝto sian sidmembron!" "Ne ekprotestis la aliaj, - "sur min metu!"... Kion do faris la Plejalta Dio, ben, al Lia nomo? Por eviti kverelojn kaj kontentigi ilin ĉiujn, Li kunigis ilin je unu granda truego, tra kiu vi, bedaŭrinde, enfalis..."

La rabena rakonto trankviligis la koleron de la policoficiro kaj li, kontentigita, disiĝis de la rabeno.

J. Kohen Cedek

 BYRON KAJ LA JUDA POPOLO

-150 jaroj de lia morto.-

En la universala literaturo troviĝas granda nombro de verkistoj, kies verkoj disvastigis multe da veneno kontraŭ la Judoj.

Byron ne apartenis al tiu galerio de venenigantoj. Animata de profunda humanismo, la nobla poeto vipis la rasan malamon kaj socialajn maljustojn.

En la komenco de la 19-an jarcento venis Anglion kelkaj grupoj de holandaj Judoj. La novenmigrintoj ĝuis plenan religian liberecon, estis tamen malpermesite al ili labori en sia profesio. Tio kaŭzis ilian amaran kaj malesperigan situacion.

Byron, kiu dum la tuta vivo batalis por altaj idealoj de la homaro ne povis silenti. Li konsideris tiun maltoleremon kontraŭ grupo de Judoj, kiel maljuston. En ĉiuj okazoj li protestis kaj akre kondamnis la landon, kiu asertis, ke ĝi estas la lando de libereco.

Por esprimi sian solidarecon kun la preskaŭ tolerata popolo, lordo Byron kreis en la jaro 1815 poemaron: "Hebreaj melodioj", kiuj fariĝis rapide mondkonataj. Ĝi estis tradukita en diversajn lingvojn. Plej impresiga estis la poemo "Priploru tiujn, kiuj ploris". Heinrich Heine tradukis ĝin germanlingven kaj Schumann kreis muzikon por multaj poemoj.

Byron pripensis la vivon kaj la batalojn de antikvaj Judoj, kiel extraordinaran ekzemplon. Li ĉerpis inspirojn ne nur de Biblio, sed de la tuta juda historio.

Antaŭ 2600 jaroj la siria reĝo Sanĥerib, sieĝis Jerusalemon por ĝin detruigi kaj mortigi la Judojn. Tiam reĝo Hizkia, vidante la danĝeron arde ekpregis petante helpon de Dio por savi la judan popolon. Laŭ la Biblio Dio sendis anĝelon kaj pereigis la fortan sirian armeon. La venkita reĝo Sanĥerib estis mortigita post sia reveno al Sirio.

Byron admiris tiun venkon de malmultaj kontraŭamasoj kaj ĝi inspiris lin krei poemon "Pereigo de la reĝo Sanĥerib".

En "Hebreaj melodioj" estis digna respondo de grandanima kaj konscia spirito, kiu kontraŭstaris mez-

epokajn leĝojn en civilizita kaj moderna ŝtato.

Estas en ili ankaŭ poemo "Ŝauĵ", kiun lordo Byron dediĉis al la unua reĝo de juda ŝtato.

La poeto Byron revis pri homaro sen antagonismoj, sen militoj kaj sen rasa malamo. "La mondon -li diris- oni devas beligi per paco kaj justo."

K. Perlman

 JERUSALEMO

Klare vidiĝas jam en horizont`
Konturoj de Jerusalemo
Belega vi estas, plej bela en mond`
Mia kara Jerusalemo.

Dudek jarcentojn al vi mi sopiris,
Preĝis, revis, anime min tiris,
Jerusalem`no Jerusalemo`revenis la filo al vi
Jerusalem`no Jerusalemo`amos vin multe des pli.

Avigdor Hameiri
(hebrea verkisto kaj poeto 1887-1973)
trad. J. Giladi

 HAVA NAGILA

Unu de niaj legantoj petis nin doni fonetikan reskribon de la konata hebrea kanto "Hava Nagila" kaj ĝian tradukon. La redakcio ĝojas plenumi tiun peton:

"Hava nagila, Hava nagila venismeña
Hava nerannena, hava nerannena,
Hava, hava nerannena.


Uru aĥim, uru aĥim be-lejv samejañ
Uru aĥim be-lejv samejañ."

Ni aldonas liberan tradukon kun notoj:



"HAVA NAGILA"... "הבילוי נגילה"

Misterioso, animabile.




Ĝo-ju, ni ĝo-ju, ĝo-ju, ni ĝo-ju



Ĝo-ju, ni ĝoju kun ga-ja kor'! kun ga-ja kor'!
Piu mosso.



So-nu la ga-ja kant' so-nu la ga-ja kant',




So-nu, so-nu la ga-ja kant'! La ga-ja kant'!
Eccitazione



Bravu, bravu fratoj, bravu gefratoj gaj-a-ni-me,



Bravu ge-fra-toj gaj-a-ni-me



Bravu do, frat, bravu do, frat,

ritardando

Fine



Kun ga-jec' en kor'!

tradukis
J. Kohen Cedek

J. Kohen-Cedek

Angulo de JELI

SEMAJNO EN HELSINGØR

Ĉiu jare antaŭ la Universala Kongreso okazas la internacia seminario en la dana urbo Helsingør. Ĉi jare partoprenis ĝin 130 gesamideanoj el 12 landoj. Inter ili estis ankaŭ 3 israelanoj.

La seminario estis trnivela: por komencantoj, perfektigantoj kaj instruistoj.

La kondiĉoj estis pli ol kontentigaj: belaj kaj komfortaj loĝejoj, abunda kaj bongusta manĝo kaj interesa programo. Inkluditaj estis ankaŭ ekskursoj al najbaraj lokoj. Oni vizitis kastelojn kaj urbeton Helsingborg en Svedio.

Partoprenantoj prelegis pri siaj landoj. Mi prelegis pri Israelo kaj montris lumbildojn, kiuj tre impresigis partoprenantojn.

Grava estas tamen la familia kaj hejma etoso, kiu regis dum la tuta semajno. Mi akiris multajn amikojn, junajn kaj pli aĝajn.

La agrabla semajno finiĝis per komuna trajnvojaĝo "dancante al Hamburgo" al UK.

Amri Wandel

ESPERANTO FLAGO

S-ano Davidoviĉ ricevis de eksterlando esperanto flagon 100x60 cm grandan. Li donacis ĝin al ELI dum Zamenhofa vespero.

PRI NIA REVUO

"The Worker Esperantist" septembro 1974 publikigis la artikolon "Aleksander Zilbernik - unua mecenato de Esperanto (A. Holzhaus), kiu aperis en I.E. n-ro 51.

 NIA MOVADO KAJ AGADO

 NOVĀJ KURSOJ

Kiel ĉiujare komenciĝis en Tel Avivo en Oktobro kurso en Junulara Centro. Ĝi estas la 21-a kurso, kiun gvidas d-ro Maŝler.

Substrekinde estas, ke dum ĉiuj 10 jaroj, dum kiuj d-ro Maŝler gvidas kursojn, neniam okazis, ke kurso ne komenciĝis pro manko de lernantoj kaj neniam okazis, ke kurso disfalis antaŭ la fino.

En klubejo daŭras kiel ĉiujare kurso por perfektigantoj. Gvidas d-ro Maŝler.

En Februaro komenciĝas nova kurso en Junulara Centro en Tel Avivo.

En Kfar Saba gvidas tri kursojn en mezlernejo kaj faklernejo s-ano J. Giladi.

En Hajfa komenciĝis malgranda kurseto, gvidanto s-ano J. Tillman.

Korespondan kurson gvidas s-ano J. Šemer.

Samideanoj estas petataj propagandi kursojn kaj sciigi pri kandidatoj d-ron Maŝler. T-A, Hapardes 11.

 PRELEGOJ EN KLUBEJO

J. Giladi, J. Tilleman-UK	en Hamburgo kaj TEJO kongreso
K. Perlmann	Fama pariza tombejo
A. Manor	La mufti de Jerusalemo
E. Haron	H.C. Andersen kaj zamenhofa traduko
A. Ron	Soko de estonteco
H. Maŝler	Lumbildoj de Svisio kaj Dolomitoj
R. Alberg	La liberiga movado de virinoj
M. Vermaas	La lasta krizo de UEA
Salutoj de	P. Gati de Hungario
" "	S. Karlson de Svedio
Amika interparolo	gvidis H. Maŝler
ZAMENHOFA VESPERO	
A. Kupermann	Malto (lumbildoj)
E. Haron	Ĉu ni bezonas internacian lingvon?
A. Manor	Politika trarigardo
H. Maŝler	Svedio
E. Haron	Danlando (lumbildoj)

 SCIIGOJ

 VENKO DE FD (ŜAKO) SIMĤA ZINNER

En la klubo "RETO" finiĝis dum la somero ŝaka turniro. venkis SimĤa Zinner, veterano de ŝakludo kaj FK por ŝakoj en Tel Avivo. Li ricevis 10 kaj duono punktoj de 14 eblaj.

Sciigis pri ĝi hebrea ĵurnalo "Saĥmat" en Oktobro. La ĵurnalo substrekas konon de internacia lingvo de s-ano Zinner.

S-ano S. Zinner ludas nun 13 internaciajn ŝakludojn, kiujn li gvidas per Esperanto.

 ESPERANTO INFORMATION

E.I. en USONO sendas en la lasta tempo al ELI multajn eltiraĵojn de usonaj ĵurnaloj. Montras ili pligrandigitan aktivecon de nia movado en USONO. Ni esperas, ke tiu aktiveco ankaŭ respeguliĝos en Israelo.

Antaŭ ne longe aperis en ĵurnalo Haarec sufiĉe granda artikolo pri Esperanto bazita je usona ĵurnalo. Post tiu artikolo venis 40 leteroj al Tel-aviva grupo, en kiuj aŭtoroj esprimis sian volon lerni esperanton. S-ro J. Šmerlis sendis al ili responde korespondan kurson. Kelkaj jam komencis lerni Esperanton.

 BELA DONACO

Aŭstralia ambasadejo sendis al kelkdek samideanoj tre bele eldonitan informilon pri Aŭstralio: "Aŭstralio-konĉizaj faktoj" ilustrita 89 paĝa kun bela kovrilo. Ĝi donas la plej gravajn informojn pri la granda por ni ne konata kontinento.

 NIAJ LEGANTOJ SKRIBAS

En junia numero de Israela Esperantisto mi tra legis versaĵon de J. Giladi "Esperanto la lingvo por ni". versaĵe ĝi estas farita imite al tre konata angla melodio, laŭ kiu niaj samideanoj kantas nian kanton "Esperanto la lingvo por ni", eĉ viaj versoj estas similaj. Por via teksto mi komponis specialan originalan muzikon kaj sendas al vi muziknotojn por piankunludo. Laŭ mi ni devas kanti antaŭ ĉio kanzonojn en originalaj versoj kaj melodioj, sed ne adaptitajn. Alie niaj kantoj ne estas tutvaloraj, se niaj verkistoj uzas nondkonatajn muzikojn. Tio signifas, ke bedaŭrinde mankas profesiaj muzikistoj en niaj medioj. La bela esperanto kanto estas plej bona propagando.

Mi preparas tutan recitalon en Esperanto.

Bulgara kantisto (partoprenis internacian vesperon en UK Hamburgo.)

v. Damjanor

Redakcio ricevis plurajn laŭdesprimojn pri la sama versaĵo.

Rumanio

Mizil,

Est. samideanoj.

via revuo aparte plaĉas al mi kaj interesas min.

Se eblas bonvolu ĝin sendi al mi ...

Kun anticipa danko Prof. T.M.

Alkmaar, Blekerskade 66

Joannie Mol

Nederlando

Estimata Redakcio, 26.12. 74

Al vi ĉiuj mi deziras feliĉan, prosperan kaj precipe pacan jaron 1975, esperas, ke la nova jaro alportos solvon de multaj problemoj. Estu konviktita, ke ni en nia lando enpense vivas kun vi...

Tutkore mi dankas por la regula sendado de via organo, kiun mi ĉiam legas kun granda intereso...

Korajn salutojn

J.M.

 VIZITIS ISRAELON

Davidman Aŝer	Parizo
H. Karlsson	Svedio
P. Gati	Hungario
M. Vermaas	Nederlando
L. Agortine	Francio
Dr. Ross G. Robbins	Australio-Kenio

 VOLAS KORESPONDI

Jakobo Dwyer, 40 Fairfield St. Accrington, Lancs. Anglio, 31 jara, elektronika inspektisto. Interesiĝas pri politiko, literaturo kaj muziko

o o o o

S-ro Bela Hubay, IV., str. Zygyvapart 10
H-5100 Faraszbereny Hungario

o o o o

Bedrich Motàlek 798-45 Suchdol u Prostojoŭva
Czechoslovakio

 DONACOJ

ELI kaj Isr. Esp. ricevis donacojn de	
brigitte Semmler	46 l.i. Germanio
d-ro A. Vedrine	100 l.i. Francio
N.Z. Maimon	16 l.i. USONO
Aŝer Meir	100 l.i. Israelo

✕✕✕✕✕✕✕

האספרנטו איסטי הישראלי, בטאון הליגה לאספרנטו בישראל

תל-אביב 61390, ת.ד. 59004

חברת 53-ינואר 1975- בעריכת אלכסנדר מנור

E N H A V O

Cionista poemo	1. L.L. Zamenhof
Kauzoj de mia eksigo	2. I. Lapenna
60-a UK en Kopenhago	5. H. Mašler
La programo de arabaj teroristoj	6.
<u>POEZIO KAJ PROZO</u>	
Jemŝan	7. A. Majkov-S. Mizeruŝa
El la juda folkloro	9. J. Kohen-Cedek
Byron kaj la juda popolo	12. K. Perlman
Jerusalemo	13. Hameiri- J. Giladi
Hava Nagila	13. trad. J.Kohen-Cedek
<u>ANGULO DE JELI</u>	
ANIA MOVADO KAJ AGADO	15. A. Wandel
	16.
Sciigoj	17.
Legantoj skribas	18.
volas korespondi	19.

Redakta komisiono
J. Giladi
D. Wunderbaum
Redaktoro
Aleksander Manor